I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)

Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

Nº 5 - 6 Majo kaj Junio 1961 11-a Jaro

## XIII-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

La XIII-a I.F.E.F.-Kongreso okazis ĉijare en Barcelono, sub la aŭspicio de la Sindikata Fako "Edukado kaj Ripozado". Estas Barcelono gastiga urbo, favora al kiu ajn progreso, tiel en la arto kiel en la scienco kaj kulturo.

La Citadela Parko, kie staris la kongresejo, estas mirinda parko, ornamita per arboj, kun longaj promenejoj, herbejoj kaj zoologia ĝardeno. Tie, en la grandaj salonoj de la restoracio ni ĝuis bongustajn manĝaĵojn, kaj bonan konversacian interŝanĝon.

Dimanĉe, la 7-an de majo, je la deka horo, okazis la solena malfermo de la kongreso en la "Salono Fomento del Trabajo Nacional" (via Layetana) prezidita de la plej altaj aŭtoritatoj: D-ro Demetrio Ramos, Provinca Delegito de "Informado kaj Turismo" kiu reprezentis S-ron Ministron de la sama fako; S-ro José M. Perxes por la Prezidanto de RENFE; S-ro Vicente Garcia Rives Nacia Sindikata Estro pri Transportoj kaj S-ro Ignacio Rubio Cabronero Ĝenerala Arkivisto de la Provinco kaj Direktoro de la Universitata Biblioteko.

S-ro Saladrigas, Prezidanto de la L.K.K. salutas kaj bonvenigas la fremdajn gastojn. Poste S-ro A. Rios Calderòn (Prezidanto de la Sindikato pri Transportoj kaj Komunikadoj) portas la saluton de la hispanaj fervojistoj; kaj, dankante pro la invito, promesas helpon al la homoj de bona volo. Vere poezia prelego estis la fest-parolado de S-ro D-roRafael Herrero, Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kiu prezentis Hispanujon kiel lando de frateco kaj de amikeco, pro tio digna Esperantujo. Parolis pri Barcelono, lulilo de Esperanta literaturo, kaj memorigis kortuŝe la ĵus mortintan poeton Ludoviko Hernàndez kiu per lia verko "Don Kiĥoto" de Cervantes, kune kun aliaj katalunaj verkistoj famigis kaj riĉigis la konsiston de Kataluna literaturo.

Delegitoj el 13 landoj: Anglujo, Austrujo, Belgujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Svislando kaj Hispanujo portis la saluton de siaj Federacioj kaj fakaj Asocioj.

Finiĝis la festceremonio per komuna fotografado sur la ŝtuparo de la Katedralo, kaj vespere ĝis nokto, oni amuziĝis ĉe la Montjuich Parko, per vizito al la grandaj lumfontoj kaj per folklora dancado en Hispana Vilaĝo de la sama parko. En tiu ĉi parko ankaŭ troviĝas la muzeo pri arkeologio, industrio kaj popularaj artoj.

Lunde. La fakprelegon prezentis S-ro J. Rodriguez Escartin, Inspektoro de la Komerca-Servo de RENFE. Oni prezentis filmon pri la traktita temo kaj montris maketon pri la aksŝanĝo laŭ la instalaĵoj en la stacio Cerberè. Poste, la landaj delegitoj kaj la IFEF-estraro estis akceptitaj en la oficejo de la Direkcio, kie oni regalis ilin per lunĉo. Salutis la partoprenantojn S-ro J.M. Perxes, Direktoro de la 5-a Zono de RENFE, kaj Ĉefa Inĝ. S. Montagut.

Mardon je la 15 h. okazis rondveturado por viziti la ĉirkaŭaĵojn de Barcelono kaj aŭtobuse oni atingis Monton Tibidabo (532 metrojn super la maro). De tie oni vidas la tutan urbon, la maron kaj , kiam aero estas pura, ankaŭ la suprojn de la Balearaj insuloj. De alia flanko oni vidas Monserrat.

Merkrede okazis akcepto de la kongresanoj ĉe la Urbodomo kiuj estas alparolataj kaj salutataj de la urba Konsilisto S-ro Paya, kaj de la ĉefo de Protokolo S-ro Castillo. Ankaŭ tie la kongresanoj ĝuis gasteman lunĉon. Vespere okazis koncerto en la salono de la kongresejo kie oni aŭskultis elektan muzikan programon, kaj famajn ĥekantistojn.

Ĵaŭdon tuttaga ekskurso al Tarragono (per speciala trajno laŭlonge sunumita marbordo), kie oni vizitis la Katedralon, la faman Roman Nekropolon kaj aliaj antikvaĵojn. Post vizito al la moderna metiolernejo la preskaŭ 800 gekongresanoj estis akceptataj en la Urbodomo de Lia Moŝto Kardinalo Benjamin de Arriba y Castro, de Generalo Sabas Navarro, de la Urbestro Francisco Sugranes, kaj de la Inspektoro de Nacia Edukado Evelio Calvet Prats. Dum la reveno halto en Villafranca de Panades, kore akceptitaj de la loka esperantistaro. Unu el mirindaĵoj de Villafranca estas sendube la "Muzeo de Vino" kiu (pro ĝia enhavo) oni konsideras unika en Eŭropo. Vizito al Vin-muzeo, kie oni nin regalis per speciala vino en karakteriza glaseto, kiun ni kunportis hejme kiel memoraĵo.

Plej parto el la partoprenantoj al IFEF-Kongreso en Barcelono aliĝis ankaŭ al postkongresa ekskurso al Palma de Majorko kie, en paradiza medio, disvolviĝis la 22-a Hispana Nacia Kongreso, kiu per tiu fakto iĝis vere internacia.

Vendredon vespere, enŝipiĝo de la kongresanoj per Majorko kiuj dum kvar tagoj ĝuis neforgeseblan travivaĵon. Ankaŭ tie la atmosfero de la kongreso vibris pro entuziasmo kaj laboro kiun oni esperas fruktodona por nia movado. La solena malfermo okazis la dimanĉon matene, en la Urba Palaco, kaj estas vere impona. Lia Moŝta "Ministro pri Informado kaj Turismo" donis al la ceremonio solenan karakteron.

Palma ĉefurbo de Majorko estas bela urbo kie oni povas admiri la famajn renasancajn palacojn, la belstilajn preĝejojn kaj monakejojn, plie ĝui la sunumitajn strandojn. Krom la urbo, ankaŭ la cetero de la insulo meritas viziton, kaj ni ĉu solaj ĉu en grupetoj profiti per ekskursi ĉian. Neforgesebla Cala Blava (ridanta golfo kiu spegulas, inter bluaj akvoj sian serenan ĉielon kaj la apudajn naturajn belecojn) Manacor kaj Porto Cristo kun iliaj famaj grotoj Del Drac kaj Hams, estis la ekskursoj oferitaj de la kongresa programo. Mirindan peizaĝon ni ĝuis inter la Del Drac-groto, kiam aŭdante sugestan violonan koncerton, ni vidis aperi, antaŭ niaj mirigitaj okuloj, tri fabelajn barkojn sur la surfaco akvo de la lazura subtera lago Martel, inter fantasmagorio de mil koloraj lumoj. Tiu supernatura spektaklo fermis la allogan programon de niaj ekskursoj en la Perlo de la Meznaro.

La revojaĝo al nia lando estis iomete malfacila kaj malagrabla pro malbona vetero, malvarmo kaj precipe pro la striko de la franca fervojo. Tamen la kongresanoj rehejmis kontentegaj pro la sukceso de la du vizititaj kongresoj kiuj bone promesas por la estonteco de nia movado.

GAMBERINI BILLI GIUSEPPINA

FRANCA FERVOJISTA ASOCIO DE SANGODONANTOJ deziras interrilati kun fervojistoj sangodonantoj el la Eŭropaj landoj. La celo estas: 1° Organizado de la sango transfuzo. 2° Eventuala ekzistado de fervojista Asocio de sangodonantoj en via lando. Bonvolu skribi al: LECLERCQ Lucien FFEA-Estraro - S.N.C.F.-V.B. - 18 Rue de Dunkerque, Paris 10° (France)

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia) - La dissendoj okazas de la h.18,55 ĝis h.19,10 (M.E.T.) - Ondlongoj: metroj 30,90; 41,24 kaj 50,34

DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1961-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

JULIO 1961-a - mardon la 4-an: Tra la literaturo - vendredon la 7-an: Italaj karakterizaj urboj: Alba kaj ĝiaj trufoj - mardon la 11-an: Grandaj Sanktulinoj: S.ta Veronika Giuliani- vendredon la 14-an Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 21-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 25-an: Tra Romo: Strato de la Imperiaj Forumoj - vendredon la 28-an: Porinfanaj verkistoj: Emilio Salgari.-

AŬGUSTO 1961-a - mardon la 1-an: Tra la literaturo - vendredon la 4-an: tri anglaj verkistinoj tre konataj en Italujo: Emily, Ann kaj Charlotte Brönte - mardon la 8-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 11-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 18-an: Italaj belartaj urboj: Venecio - mardon la 22-an: La itala navigisto, laŭ kiu nomiĝis Ameriko: Amerigo Vespucci - vendredon la 25-an: Etruskaj urboj: Orvieto - mardon la 29-an: Alpismo en Valtellina.

La fakestro: L. Minnaja

RADIO-SOFIA disaŭdigas en Esperanto ĈIUDIMANĈEde 19 ĝis 19,25 horo laŭ la horsistemo de Greenwich. Ondoj: metroj 39,11 kaj 41,18. la disaŭdigo estas ripetata la saman tagon de 22,30 ĝis 22,55horo laŭ la horsistemo de Greenwich. Ondoj: metroj 30,93 kaj 41,35.